
# XVII.ª HISPANA KONGRESO de ESPERANTO



JULIO
1956

# BARCELONA

15x2020helSKKL-1/42

SKKL- 1/42

# Barcelono:

Arkivo de ĝentileco,
Rifuĝejo por fremduloj,
Hospitalo por malriĉuloj,
Patrujo de bravuloj,
Venĝo de ofenditoj
kaj plaĉa respondado
de firmaj amikecoj
kaj senegala je sidejo
kaj beleco.

Miguel de Cervantes

# Bonvenon

La Organiza Komitato, nome de la Barcelona esperantistaro, atendas senpacience vian alvenon al nia grafa urbo. Ni ĉiuj deziras denove kunveni en rondo familia, kaj daŭrigi alifoje nian esperantan laboron en la kadro de nia kongreso.

Ni speciale esperas ke kun via sincera kaj aktiva kunlaboro, la fruktoj de niaj laborkunsidoj estos abundaj kaj sukcesplenaj.

Ni vere scias ke, malgraŭ nia intenco, ne ĉiam niaj aranĝoj estos perfektaj, sed vi estu certaj ke ni preparis ilin kiel eble plej bone. Tiel do, bonvolu akcepti ilin tre indulge kaj bonkorece.

LA ORGANIZA KOMITATO

---

## KONGRESKARTO

Nomo Ernesto Tudela Flores

Adreso Rusafa, 45 – Valencia

Lando ..........

Kongresnumero 361

Membro de H. E. F. n.° ..........

Akompanant(in)oj ..........

# LA ESPERO

En la mondon venis nova sento,
Tra la mondo iras forta voko;
Per flugiloj de facila vento
Nun de loko flugu ĝi al loko.

Ne al glavo sangon soifanta
Ĝi la homan tiras familion:
Al la mond' eterne militanta
Ĝi promesas sanktan harmonion.

Sub la sankta signo de l'espero
Kolektiĝas pacaj batalantoj,
Kaj rapide kreskas la afero
Per laboro de la esperantoj.

Forte staras muroj de miljaroj
Inter la popoloj dividitaj;
Sed dissaltos la obstinaj baroj,
Per la sankta amo disbatitaj.

Sur neŭtrala lingva fundamento,
Komprenante unu la alian,
La popoloj faros en konsento
Unu grandan rondon familian.

Nia diligenta kolegaro
En laboro paca ne laciĝos
Ĝis la bela sonĝo de l'homaro
Por eterna ben' efektiviĝos.

L. Zamenhof.

## PRESIDENCIA DE HONOR

Excmo. Sr. D. Felipe Acedo Colunga
Gobernador Civil de la Provincia de Barcelona

Excmo. Sr. D. Juan Bta. Sánchez González
Capitán General de la IV Región Militar

Excmo. Sr. D. Antonio M.ª Simarro Puig
Alcalde de la Ciudad

Excmo. Sr. Marqués de Castellflorite
Presidente de la Excma. Diputación Provincial

Excmo, y Rvdmo. Sr. D. Gregorio Modrego Casaus
Arzobispo-Obispo de Barcelona

Excmo. Sr. D. Francisco Buscarons Ubeda
Rector Magnífico de la Universidad de Barcelona

## COMITE DE HONOR

Ilmo. Sr. Dr. D. Rafael Herrero Arroyo
Presidente de la Federación Española de Esperanto

Ilmo. Sr. D. Pedro Font y Puig
Catedrático de Psicología de la Universidad de Barcelona

Rvdo. Padre D. José Casanovas Pbro.
Profesor Decano del Seminario de Gerona

Ilmo. Sr. D. Enrique Ramos Sanz
Presidente de la Casa Valencia.

Ilmo, Sr. D. José Basora Martí
Presidente de la Cooperativa de Tejedores a Mano

## AŬTOGRAFOJ

## COMITE ORGANIZADOR

| | |
|---|---|
| *Presidente* . . . . | *D. José Gómez Ibars* |
| *Vicepresidente* . . . | *D. Pablo Claramunt Gilabert* |
| *Secretario* . . . . | *D. José Martorell Aulet* |
| *Vicesecretario.* . . . | *D. Rafael Ayala Gómez* |
| *Tesorero* . . . . | *D. Juan Viver Salarich* |
| *Contador* . . . . | *D. Isidro Berniol de Yebra* |

## COMISIONES ESPECIALES

| | |
|---|---|
| *Recepción* . . . . | *D. Rafael Gisbert García* |
| *Filatelia.* . . . . | *D. Evaristo Gil Pallarés* |
| *Festejos.* . . . . | *D. Escolástico Vilella Roig y* |
| | *D. Francisco Vilà Costa* |
| *Turismo* . . . . | *D. Juan Bta. Feliu Bover* |
| *Propaganda* . . . . | *D. Jaime Montfort Canela* |

*Secundados por todos los Grupos de Esperanto de Barcelona*


**En nuestra época toda persona debe conocer el idioma auxiliar**

# ESPERANTO

**Desde su propio domicilio, con un pequeño rato diario y por una ínfima cantidad, Ud. lo dominará en pocos meses.**

*Pida informes gratis a:*

CURSOS DE ESPERANTO POR CORRESPONDENCIA

*de la*

**FEDERACION ESPAÑOLA DE ESPERANTO**

Calle Forn, 19 MOYÁ (Barcelona)

# PROGRAMA

**MARTES 24** De las 17 a las 20 h. recepción de los congresistas y distribución de documentos. De las 20 a las 21 h. «Velada de Amistad». Local: Casa Valencia - Calle Córcega, 335 - Teléfono 28 01 95.

**MIERCOLES 25** De las 9 a las 11 h. distribución de documentos en la Casa Valencia. A las 12 h. Solemne apertura oficial del Congreso, en el Salón de Ciento, del Excmo. Ayuntamiento de Barcelona. A las 18 horas visita a las Exposiciones de Esperanto, situadas en la Antigua Capilla del Hospital de la Santa Cruz, entrada por la calle Carmen, 47. A continuación tiempo libre para visitar la ciudad.

**JUEVES 26** A las 10 h., primera Sesión de Trabajo. A las 18 h. Sesiones de Trabajo de las Secciones. A las 20'30 h. conferencia a cargo del Dr. D. Mariano Solá, Vicepresidente de la Federación Española de Esperanto. - Local: Cámara Oficial de Comercio y Navegación - P.º Isabel II, 1.

**VIERNES 27** A las 10 h. segunda Sesión de Trabajo. - A las 17.30 h. exámenes de Esperanto. - Local: Cámara Oficial de Comercio y Navegación. - Aproximadamente a las 19.30 h. el eminente Dr. D. Pedro Font y Puig, Catedrático de Psicología, Jefe del Instituto San José de Calasanz del Consejo Superior de Investigaciones Científicas y de la Sección Pedagógica del Instituto de Estudios Hispánicos, disertará sobre el Esperanto, en el Aula Magna de la Universidad. Aunque esta conferencia va destinada al público no esperantista, damos cuenta de ello pues creemos interesará a muchos congresistas.

**SABADO 28** A las 9 h. salida hacia Montserrat en autobús. Punto de partida, Viajes Marco, Rambla Estudios, 46, regresando a Barcelona con tiempo sobrado para cenar y asistir a las 23 h. al Festival en la Plaza del Rey, con participación de la Banda Municipal y los Coros Clavé.

**DOMINGO 29** A las 10 h. Solemne Misa, con sermón en Esperanto, en la Iglesia Románica de Santa Ana, próxima a la Plaza de Cataluña. A las 11.30, presentación de la comedia en tres actos de Molière «Jorge Dandin», vertida al Esperanto por el Dr. Zamenhof. La representación tendrá lugar en el teatro C.A.P.S.A., Vía Layetana, 134. A las 14.30 Banquete Oficial en el Restaurante del Casino Parque de la Ciudadela. A las 16.30 café. A las 17 Clausura del Congreso.

La Literatura Vespero okazos post la Fermo de la Kongreso, en la Kooperativo de Manteksistoj sidejo de la Grupo Esperantista «Stelo de Paco» - Str. Teruel, 26-28, je la 22.30ª.

# Laŭdo al Barcelono

BARCELONO (1.402.000 enloĝantoj) situas ĉe la mediteranea marbordo, suden orientita. Ĝi kuŝas sur ebenaĵo, inter riveroj Llobregat kaj Besós. De oriento al okcidento, limigas ĝin, montara amfiteatro kies plej alta punkto estas monto Tibidabo (532 metrojn super la marnivelo).

La origino de Barcelono perdiĝas en la plej praaj tempoj. Ĝian historion, ni ekkonas dank'al la heredaĵo de sennombraj monumentoj, kiuj atestas pri la prosperaj epokoj travivitaj de la urbo.

La primitiva urbokerno, kiun tratranĉas la mondfama aleo «Ramblas», estas la koro de moderna urbego. En ĝi situas la Gotika Kvartalo, arkitekturjuvelo de la plej granda artvaloro, kie pasinto kaj nuntempo harmonie kunvivas. Ĝi staras sur la Mons Taber de la romanoj, kie oni povas admiri la unikan mirindaĵon kies arta kaj historia valoro estas tute nekalkulebla.

Barcelono, estas tre vigla, industria kaj komerca urbo. Haveno de unua kategorio, ĝi estas baza ero en la ekonomia vivo de la lando. La komerca kaj banka centro, estas Placo Katalunujo, kie la aktiveco atingas la plej altan punkton.

En la alta parto de la urbo, situas Placo Calvo Sotelo, kerno de moderna kaj eleganta zono, kie la grandeco de ties nuntempa karaktero, harmonie najbaras kun la romantika centra bedo kaj la lageto kiu donas al ĝi la plej belan ĉarmon.

La genia arkitekto Gaudí, donacis al Barcelono netakseblajn juvelojn, tiaj kiaj la Templo de la Sanktega Familio, Parko Güell, Ŝtona Domo, kaj aliaj.

Jen, kio atendas vin...

# *Elektita Teatra Prezentado*

Dimanĉo, 29ª julio 1956ª

je la 11ª matene

en la

C. A. P. S. A. - TEATRO

Str. Via Layetana, 134

## PROGRAMO

1.ª Parto: Nia eminenta literaturisto Ludoviko Hernández, prelegos pri Molièr-a Teatro.

2.ª Parto: Ludado de triakta komedio de Molière.

# GEORGO DANDIN

Tradukita de D-ro. L. L. Zamenhof

PARTOPRENANTOJ:

Sro. Francesc Vilà . . . . . . kvazaŭ . . . . . Georgo Dandin

F-ino. Juanita Aragonés . . . » . . . . . Angeliko

S-ro. Pablo Claramunt . . . . » . . . . . S-ro. de Sotenville

F-ino. Carmen Clofent . . . . » . . . . . S-ino. de Sotenville

S-ro. Ricardo Güell . . . . » . . . . . Klitandro

F-ino. Montserrat Clofent . . » . . . . . Klaŭdino

S-ro. Isidro Berniol . . . . » . . . . . Lubin

S-ro. Tomás Puñet . . . . . » . . . . . Colin

Scena Direktoro: S-ro. Francesc Vilà

Vestaĵoj: Castellví — Dekoracio: F. Forc

Perukisto: P. Sánchez — Sufloro: E. Vilella

# MONTSERRAT

Tiu-ĉi mirinda monto, situas je 40 km. de Barcelono kaj estas vera fiero de nia lando. Montserrat, estas geologie, konglomerata maso de mineralaĵoj nature kuncementitaj kiu elirinte pasintece el la mara fundo, nune montras altegajn kaj kapricajn konusformoj, ravantaj nian spiriton.

Jam antaŭ longe la fama scienculo kaj germana vojaĝemulo Humbolt vizitadis ĝin. Laŭ lia opinio, Montserrat estas unika en la mondo.

Ankaŭ por la maristoj, ĝi iĝis antikvece la necesa lumturo, ĉar ĝi estas videbla de ili, de tre malproksime.

Nia senmorta poeto Verdaguer en la «Odo al Barcelono», kvalifikas ĝin, unu el la du mampintoj de Katalunujo; la alia estas Montseny.

De la pinto de Sankta Jeronimo (1.236 metrojn super la marnivelo), oni ĝuas nepriskribeblan panoramon, kies beleco famigas la monton.

Ĝuste en la krutaj deklivoj de la menciita monto staras la famega Benediktana Monaĥejo, en kiu la monaĥoj sin dediĉis ĉiutempe al la disvastigado de la religia kaj muzika kulturo. Speciale unu el ili, la pastro Gregorio M.ª Suñol (O. S. B.) konkeris por sia ordeno meritplenan gloron. La katalunaj muzikistoj-Nicolau, Morera, Millet, Vives, Pérez Moya, Pujol k. a., estas infankantistoj de la Benediktana Ĥoro. La Monaĥejo posedas interne artan trezoron donacita de la popola fervoro.

Kiel sciate, la Grafo Wifredo la Vila, konstruigis tiun-ĉi romanikan monaĥejon, kiu estas la sidejo de la «Brunulino», la mirakla patronino de Katalunujo, vizitita de reĝoj, princoj, potenculoj kaj sanktuloj. El la religia vidpunkto Montserrat estas la fokuso de la kataluna pieco kaj pilgrimejo de Hispanio kaj de la tuta mondo.

Finfine, ni ne povas rezisti traduki strofon de la kanto «El Virolai» de la inspirita poeto Verdaguer.

«Rozo d'april'
de l'monto Brunulino
de Montserrat stel'
Lumigu nin
Katalunar'reĝino
Ĝis la tre bela ĉiel' »

# CONGRESOS NACIONALES DE ESPERANTO

| | | |
|---|---|---|
| 1.° | Barcelona | 1920 |
| 2.° | Zaragoza | 1921 |
| 3.° | Valencia | 1923 |
| 4.° | Bilbao | 1924 |
| 5.° | Córdoba | 1925 |
| 6.° | Madrid | 1926 |
| 7.° | Sevilla | 1928 |
| 8.° | Oviedo | 1929 |
| 9.° | Madrid | 1932 |
| 10.° | Santander | 1933 |
| 11.° | Barcelona | 1936 |
| 12.° | Tarrasa | 1951 |
| 13.° | Valencia | 1952 |
| 14.° | Bilbao | 1953 |
| 15.° | Zaragoza | 1954 |
| 16.° | Gijón | 1955 |

17.° BARCELONA 1956

Congresistas inscritos hasta el 14/7 = 445

---

## ESPERANTISTA INTERNACIA GEEDZIĜO

La plej simpatia noto de nia nunjara kongreso, sendube estos la geedziĝo de Barcelona samideanino, kun franca samideano.

Ŝi estas, fraŭlino Marta García Picó, la simpatia ekssekretariino de la Esperanta Grupo «Stelo de Paco».

Li estas S-ano. Jacques Hibon Maitre, oficisto de la «Cie. Thelemechanique» de Parizo.

La geedziĝo okazos la 26 julio je la 12ª h. en la Paroĥejo de San Juan Bta. de Gracia, fare de la esperantista Pastro Josef Casanovas, Profesoro de la Seminario en Gerono, kiu jam preparis la koncernajn tekstojn en Esperanto.

Nome de la tuta esperantistaro, ni esprimas al la geedziĝontoj, niajn plej varmajn bondezirojn.

# Viajes Marco

VOJAĜAGENTEJO

STR. RAMBLA DEL CENTRO, 46
STR. PASEO DE GRACIA, 44
TELEFONO 31 84 07

FORFAJTAJ SERVOJ
SPECIALECO: VOJAĜOJ AL MALLORKA

ĜENERALA REZERVADO DE BILETOJ, HOTELOJ, KTP.




Tip. STUDIUM - Viladomat, 10 - Barcelona